REKTA FLUGO EL AMSTERDAMO AL FORTALEZO
ekde € 849,00

Estimataj kongresanoj,

Kun granda ekscito ni preparas nin por la 87-a UK en Brazilo. La rava nordorienta brazila metropolo Fortalezo atendas la esperantistojn kun same granda ekscito! Siaflanke la LKK kaj la Kongresa Fako de UEA faris ĉion por oferti al vi idealajn kondiĉojn kaj bonegajn prezojn por flugi al la kongreslando, bone loĝi kaj interese ekskursi kaj kongresi en Cearao.

La Dua Bulteno estas nun preta kun tuta gamo da eblecoj kaj ege varia oferto de ĉio kion vi povas bezoni por senzorge kongresi. Aparte vasta kaj diversflanke taŭga estas la flugoferto. Kaj krome ĝi estas, laŭ niaj konoj, la plej malmultekosta oferto kaj la plej plena kiun oni povas ricevi. Oni ankaŭ ne forgesu ke Varig, la oficiala flugkompanio de UK, kaj Air Holland kreis specialajn prezojn por niaj kongresanoj. Do, bv. ne heziti tuj mendi, ĉar lokoj povus elĉerpiĝi, kaj frua mendo estas garantio de frua enordigo de via vojaĝo.

Ni ankaŭ ŝatus averti vin pri kelkaj neseriozaj ofertoj kiujn ricevis pluraj gesamideanoj listigitaj en la Jarlibro de UEA aŭ en iuj Kongresaj Libroj. Du agentejoj fakte senrajte misuzis niajn eldonaĵojn kun adresoj de niaj membroj kaj kongresanoj. UEA kaj LKK ne staras malantaŭ tiuj ofertoj kaj ne povas protekti vin de riskoj kiujn ili enhavas. Laŭ nia takso, tiuj ofertoj ne klare prezentas ĉiujn aspektojn de siaj flugaranĝoj: ofta ŝanĝado de flugoj, tro longa daŭro de vojaĝoj, kaj ankaŭ la prezoj ne estas plenaj kaj definitivaj. Do, povus esti pluraj surprizoj por la vojaĝantoj. Tamen, se oni estas vere aventurema kaj riskema, jen okazo por transkontinenta kaj financa aventuro.

Tute male, kun la ofertoj preparitaj de LKK, vi estas en sekuraj manoj de la komenco ĝis la fino de via vojaĝo. Krom tre diversaj ebloj flugi kun Varig el Eŭropo, Usono kaj Japanio, ni havas ankaŭ specialan oferton de Air Holland por tiuj kiuj ŝatus vojaĝi per *rekta* flugo el Amsterdamo al Fortalezo kontraŭ aparte rabatita kongresa prezo de 849 EUR por naŭtaga vojaĝo. (Por pli longa restado necesas krompago de 30 EUR). Alvenon al Amsterdamo vi devus mem aranĝi. La prezo inkluzivas ankaŭ la flughavenan imposton kaj transporton de flughaveno al la hoteloj en Fortalezo.

La ekflugoj el Amsterdamo estas je la 26-a de julio kaj 2-a de aŭgusto (vendredoj) kaj vi povas elekti inter vojaĝoj de 9, 16 kaj 23 tagoj. Vi povas kombini tiun ĉi vojaĝon kun la programo de antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj el la Dua Bulteno, la hoteloferto kaj la kongresa programo kaj tiel mem krei por vi la plej taŭgan kaj ĉiam certe la plej ekonomian varianton kiu pleje konvenas al via persona situacio.

Kun sinceraj salutoj,
Flugoservo de la Kongresa Fako de UEA

P.S. Bv. noti ke la rekta flugo ne estas de Varig, kaj ke tial vi ne povas uzi la avantaĝojn de Brazil Airpass, sed se vi bezonas enlandajn flugojn ni serĉos por vi plej taŭgajn eblojn kun la plej bonaj prezoj.

MENDILO DE REKTA FLUGO AL FORTALEZO DE AMSTERDAMO

Nomo _____

Lando _____ UEA-kodo __ __ __ __ – __ Kongresa numero _____

Retadreso _____ Tel. _____ Fakso _____

Dato de ekflugo (bv. cirkli): 26 julio 2 aŭgusto

Dato de reflugo (bv. cirkli): 9 aŭgusto 16 aŭgusto 23 aŭgusto

Mi ankaŭ volas ricevi oferton por internaj flugoj en Brazilo por flugoj de Fortalezo al _____ je (dato) _____ kaj (bv. listigi aliajn flugojn kiujn vi bezonas kaj la datojn de flugoj) _____.

La lasta flugo devas esti reen al Fortalezo, de kie vi reflugos al Amsterdamo. La flugo de Amsterdamo estos frumatene (ĉ. 07h00), kaj la reflugo de Fortaleza estos posttagmeze, kun alveno en Amsterdamo la sekvan matenon.

☐ Mi volas ricevi oferton ankaŭ por tranokto en Amsterdamo por (dato) _____ kaj ŝatus loĝi en hotelo (bv. cirkli): 3-stela 4-stela

Mi pagas: ☐ el mia UEA-konto kun la supre indikita kodo.
☐ per kreditkarto n-ro _____ valida ĝis _____.
(bv. cirkli: Visa / American Express / Master-Eurocard)
Mastercard-kontrolnumero (tri ciferoj, dorse de la karto) __ __ __
☐ ĝirkonto n-ro 627337 de la Universala Kongreso de Esperanto, Postbank, Rotterdam.
☐ per banka ĝiro al ABN-AMRO Bank Rotterdam, konto 42.69.01.444 je la nomo de Universala Kongreso de Esperanto (bv. aldoni 10 EUR por kostoj).
☐ al mia landa peranto.
☐ alimaniere (bv. indiki) _____.

Mi sendas tiun ĉi mendilon per (bv. cirkli) ordinara poŝto fakso rete
alimaniere (bv. indiki) _____ kaj volas ricevi respondon per _____.

_____ _____
Loko kaj dato Subskribo